

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Vi aŭdas la duan prelegon pri tiu temo.

La Rezolucio de la Konsilio pri Sekureco, kiu estis plej malfacile plenumbla, estis tiu, kiu asertis: « *Defendi la landon kontraŭ la fremda enmiksiĝo en la internajn aferojn de Kongolando, tio interalie per elimino de la dungsoldatoj.* »

La dungsoldatoj estis nekongolandanoj rekrutitaj eksterlande kaj truditaj en la landon dank'al alta soldo por en ĝi batali sub la ordonoj de la provincaj aŭtoritatoj de Katango. Tiuj dungsoldatoj ĉefe enkadrigis la katangan ĝendarmaron, kiu fariĝis vera armeo anstataŭ resti nura polico. Ĝi estis forte armita, disponis pri multnombraj kirasitaj veturiloj kaj estis apogata de aviadoj. Tiu ĝendarmaro enkadrigita de dungsoldatoj servis en Katango por lukti kontraŭ la triboj malfavoraj al la partio de s-ro Tshombe kaj por malebligi la Forton de Unuiĝinta Naciaro efektivi la adoptitajn rezoluciojn. Laŭ taksadoj la nombro de dungsoldatoj altiĝis ĝis 600 soldatoj ĉefe belgaj kaj francaj, kvankam aliaj nacioj ankaŭ estis reprezentataj.

La UNO-trupoj dum tri-jara okupado en Kongolando uzis perforton por operacioj de fakta graveco nur trifoje. Tio ĉiam koncernis la eliminon de la dungsoldatoj.

Operacio de kolektado de dungsoldatoj komenciĝis laŭ paca metodo la 28-an de aŭgusto 1961 kun la apogo de s-ro Tshombe mem. Ĝin oni provizore haltigis por permesi al konsuloj mem okupiĝi pri la reheimiĝo de siaj nacioj. Nenia rezulto tiel enlistiĝis. Tiam UN reprenis sian operacion la 13-an de septembro. Tiun ĉi fojon ĝi renkontis rezistadon de la dungsoldatoj, kiuj ordonis pafi sur la UN-trupojn. Dum pluraj tagoj okazis bataletoj, precipe en Elisabethville. Pro tio la ĝenerala sekretario de Unuiĝinta Naciaro veturis Kongolandon por konversacii kun s-ro Tshombe en la celo difini la kondiĉojn de batalĉeso kaj ekzameni diversajn aliajn demandojn. Ni scias, ke dum tiu vojaĝo s-ro Hammarskjold mortis en Ndola en tragika akcidento.

Dua konflikto komenciĝis en decembro 1961. Tiam s-ro Tshombe instigis siajn partianojn al perfortaj agoj kontraŭ la UN-forto. Planitaj provokoj, ĉikanoj kaj atakoj komenciĝis kontraŭ la personaro de UN en Elisabethville. Grupo de dungitoj provis asfiksii la UN-forton okaze de deĵorŝanĝo de du batalionoj. Baraĵoj malebligis la movon de la trupoj de UN, kiuj estis fortranĉitaj de sia flugejo. Konversacioj inter la funkciuloj de UN kaj la katanga registaro daŭris plurajn tagojn sen alporti rezultojn. Uzo de perforto do estis necesa por redoni mov-liberon al la UN-trupoj. Tiu operacio de malvasta amplekso komenciĝis la 5-an de decembro. La saman tagon s-ro Tshombe jam ekveturis al Kitona por konversacii kun la kongolanda unua ministro Adula. Tie plian fojon s-ro Tshombe rezignis pri sia secesia politiko.

UN faris ĉion eblan por efektivi la promesojn de s-ro Tshombe kaj solvi per la vojo de konversacioj kaj negocadoj la malfacilaĵojn ekzistantajn inter la centra kongolanda registaro kaj la katanga provinca registaro. Ambaŭ registaroj estis akceptintaj la U Thant-Planon, sed la provoj ĝin efektivi restis vanaj.

En decembro 1962, tio ĉiam en Elisabethville, la katanga ĝendarmaro ekpafis sen averto sur la poziciojn de UN. En tiu afero la trupoj de Unuiĝinta Naciaro pruvis rimarkindan disciplinemon. Kvankam ili suferis perdojn, ili skrupule konformiĝis al la ordono ne respondi al la katanga pafado, kiu intermitis dum ses tagoj.

Dum tiu periodo reprezentantoj de UN entreprenis ĉion eblan por konvinki s-ron Tshombe ĉesigi la pafadon de siaj soldatoj. Ĉu la prezidanto de Katango ne volis, aŭ ĉu li ne regis la situacion, la estonto tion klarigos. Por la tria fojo UN devis entrepreni perfortan operacion por elimini la dungsoldatojn kaj la ĝendarmaron de la regiono Elisabethville. Jam la 9-an de

januaro 1963 s-ro Tshombe anoncis sian intencon garantii al la personaro de Unuiĝinta Naciaro movo-liberecon en tuta Katango. Tio efektiviĝis kaj naskis pli agrablan klimaton.

Fatale tiuj tri bataloj kaŭzis perdojn inter la militistoj kaj civiluloj. Oni ilin nur povas bedaŭri. Sed se oni bazas sin sur normalaj militaj kriterioj por la taksado de la perdoj, oni konstatas, ke ili estas malgravaj. Jen frukto de la strikta disciplinemo de la trupoj de UN.

Regule la katanga propaganda-servo diskonigis dum tiuj krizaj momentoj novaĵojn pri la krueleco de la trupoj de Unuiĝinta Naciaro. Temis plej ofte pri absurdaĵoj senbazaj elpensitaj de la servo mem. Tamen okazis kelkaj bedaŭrindaj agoj. Ĉiufoje rapida kaj ĝisfunda enketo celis starigi la kulpecon de la interesataj soldatoj kaj trudi al ili merititan punon. La katanga propagando volis kredigi, ke Unuiĝinta Naciaro entreprenis konker-militon kun koloniista karaktero en Kongolando. La rezolucioj de Konsilio pri Sekureco prave asertis la kontraŭon. Cetere la piruetoj de s-ro Tshombe ne favoris lian politikon. Neniu suverena ŝtato agnoskis al Katango la sendependecon. Neniu ŝtato eĉ apogis la secesion de tiu provinco el Kongolando. Sed pri tiu aspekto de la kongolanda afero ni parolos dum la venonta semajno.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-